



PONTO



Jaro 6 N-ro 4 (34) Organo de Sunda Esperanto Agado okt. 2007

Lingvo-festivalo en Kopenhago



La 2-a lingvofestivalo sukcese okazis la 15-de sep. en Kopenhago. Esperanto estis prezentita de Ilena Schröder. Sekve Regin Larsen donis fulmkurson por komencantoj. Esperanto Desperado muzikumadis montrante ke eĉ artefarita lingvo havas kulturon. Pli pri la festivalo vi povas legi sur paĝo 3.



Maldekstre fotoj de la esperanto-stando kaj muziko de Esperanto Desperado la 15-9 en Kopenhago.

Nästa Ponto, nr 5
utkommer ca 7/12
Skicka allt material till
Karin Lindquist
senast den 16/11


Sunda Esperanto Agado

Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/redakta komitato:

Kontaktperson: *Karin Lindquist* karin@agado.net
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20

Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝarangō), Per-Olov Johansson (presado)



Agado de la bicikla grupo

2/9 la grupeto vizitis la urbajn tabulojn kaj algluis foliojn pri venonta kursoplano. Ankaŭ la biblioteko kaj kelkaj butikoj ricevis la informilon.

Vizito de samideano

9-11 sept. sinjoro Robert Kueny el Geishouse, Francio kune kun Asta Schaedel kaj P-0 Johansson eltrovis partojn de nia urbo. Bedaŭrinde malbona vetero ankaŭ akompanis nin, kiu malfaciligis piediradon en la malmoderna urbocentro, sed la torson kaj la ponton ni zorge studis. Roberto de multaj jaroj jam antaŭĝojis travivi la nordan parton de Finnlando kaj nun komencis la longan vojaĝon per trajno kaj pramo. La 30-an de septembro li denove hejmenvenis. Dum la kunestado mi atendis lian povon kapti la eblecon klarigi la avantaĝojn de la internacia lingvo dum kontakto kun malmoanoj

Kluba membreco por 2008

Membro de KEM	150 kr
Junulo ĝis 20 jaroj	60 kr
Familio	200 kr

Kassören tackar för tidig betalning till plusgiro 3 87 14-2

Malmö Esperantoförening
Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ
☎ 040-18 71 90
Poŝtgiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
Sten Svenonius sten@agado.net
☎ 040-19 14 77

Kulturaj tagoj en Kvarnby popolaltlernejo

La 3-5 de oktobro okazis "kulturaj tagoj" en la popolaltlernejo. Inter diversaj temoj elekteblaj por la kursanoj troviĝis ĉijare ankaŭ esperanto. La intereso pri la kurso estis sufiĉe granda kaj deko da partoprenantoj pli malpli partoprenis. Post la kurso estis prezentado por la tuta lernejo de la diversaj aktivecoj. Estis diligentaj kaj pozitivaj partoprenantoj sed eble plej ĝojiga estas la ĝenerale tre pozitiva akcepto de esperanto inter multaj instruistoj kaj dungitoj, kiu nuntempe regas en la lernejo.

Sten Svenonius
Instruisto de la kurso



Nekrologoj

Britta Lindeberg

Nia kara membro Britta Lindeberg forpasis 90-jara. Jam dum la 1930-aj jaroj ŝi lernis Esperanton en Elsinoro. Ŝi estis fidela membro kaj partoprenis en nia kluba laboro. I a ŝi aranĝis internacian ornitologian renkonton. Ĉiam gaja kaj helpema ŝi postlasas helan memoron

Asta Schaedel

Sven Sjöblom

En la aĝo de 83 jaroj Sven Sjöblom mortis la 5-an de oktobro. En siaj junaj jaroj li estis unu el la fondintoj de la junulara grupo "Sablokesto" kaj poste estrarano de KEM. La plej granda laboro li plenumis kiel prezidanto kaj estro de Eldona Societo de Esperanto post ĝia translokado al Malmö.

Li ripozu en paco.

Gertrud Lund

Membreco en KEM kaj SEF

Membro de KEM/SEF	310 kr
(160 por SEF)	
Junulo ĝis 20 jaroj	140 kr
(80 por SEF)	
Familio	440 kr
(240 por SEF)	

Kontaktilo

*Membrogazeto de K.E.K
Konversacia Esperantista Klubo
Kopenhago
N-ro 4 (673) 2007 71a-jaro*



Klubkunveno la 3-an de septembro

Mogens Rude Andersen rakontis pri du iom forgesitaj pioniroj:

Christian Nielsen Vejbaek (1827-1896) estis tre stranga, sed ankaŭ tre kara kaj kredeble sufiĉe respektata viro loĝanta en Flensburg. Li multe aktivis por la danaj lingvo kaj kulturo en Slesvigo, kiu tiutempe estis sub germana rego. Tamen li ankaŭ trovis tempon por kontakti Zamenhof por peti permeson kompili la unuan danlingvan Esperanto-lernolibron, kiu aperis jam en 1890. Bedaŭrinde ĝi ne havis multe da efiko, ĉar post lia morto oni ial forbruligis la restostokon.

La lernolibron tamen atingis *Peter Kristian Toksvig* (1851-1932), kiu fondis la "Societon de Danaj Esperantistoj" en 1897. Malgraŭ la nomo, la societo ŝajne precipe funkciis kiel loka klubo en Nykøbing S. Ankaŭ tiu iniciato ne havis tujan kaj vastan efikon, ĉar Toksvig elmigris por longa tempo al Usono, kaj li revenis nur post kiam KEK kaj CDEL (la unua nomo de DEA) estis kreitaj en 1908.

Kiel kutime, Mogens estis diligente preparinta sian prezenton, interalie kontaktinte la nun vivantajn parencojn de Toksvig. Kune kun lia bona kaj klara prononco, tio garantiis tre interesan prelegon.

La Kopenhaga Internacia Tago la 9-an de septembro

La ĉi-jara dana somero malbelis; sed tiu ĉi dimanĉe belis, verŝajne pro tio multaj personoj profitis viziti la

Kopenhagan Internacian Tagon. Ĉe la budo ludante esperantan muzikon ni prezentis diversajn librojn kaj flugfoliojn. La tutan tagon ni okupiĝis pri la personoj, kiuj interesiĝis pri nia budo.

Lingvo-festivalo la 15-an de septembro

Post tre favora artikolo pri la ideo de lingvo-festivaloj kaj Esperanto skribita de Ole Stig Andersen en la gazeto 'Information' vendredon la 14-an de septembro ni eĉ pli nervoziĝis pri la fakta evento. Malgraŭ kelkaj lastmomentaj nuligoj, ni sukcesis trovi aliajn solvojn, kaj finfine ni konstatis, ke la festivalo sufiĉe bone funkciis.

La gastigantoj en la Gronlanda Domo komencis la festivalon per dana kaj gronlanda paroladoj pri la monda lingva riĉeco. Post tio la ambasadoro de Rumanio, Doktoro Theodor Paleologu angle parolante donis la unuan prelegon pri la historio de la rumana lingvo kaj ties nuntempa situacio. Inter 11.00 kaj 17.00 estis 25 diversaj okazaĵoj kaj 14 budoj prezentante entute 18 lingvojn kaj la problemaron de la nuntempa lingvo-situacio. Ileana Schrøder prelegis pri Esperanto, kaj sekve Regin Larsen donis fulmkurson por komencantoj. Esperanto Desperado muzikumadis montrante ke eĉ artefarita lingvo havas kulturon. Channe Nussbaum kaj lia duo ludis Klezman muzikon. Ludante sian gitaron Anda Zarane kantis latviajn popolo-kantojn. Por la vetemaj estis lingvo-konkurso kun alogaj gajnoj, kvankam neniu plensukcesis oni trovis gajnojn. Por la manĝemaj gastoj ne mankis bongustaj hejmbakitaj kukoj kaj sandviĉoj.

Kiom da personoj partoprenis la festivalon? Tiom, sed pro la amaso de aktivaĵoj, ni ne povas diri kiom. La etoso estis agrabla, kaj pluraj personoj jam petas al ni, ke ni denove aranĝu festivalon venontjare.

Kurso por komencantoj.

Ekis porkomencanta kurso en KEK la 17-an de septembro. Jens Stengaard Larsen gvidas la kurson uzante la Zagreban Metodon. La partoprennombro estas iom fluktua, ĉirkaŭ 6.

Kurso por daŭrigantoj.

Regin Larsen gvidas tiun ĉi kurson.

Arne Casper kaj lia grupo okupiĝas pri la historio de la dana movado.

La studgrupo de BenWiinberg funkcios 'kiel kutime' studante la libron *Faktoj kaj Fantazioj*

Lu 15/10 Kursoj kaj studgrupoj
Lu 22/10 Ann-Louise Åkerlund prelegos pri la temo 'Vojaĝoj per karavan-aŭto'
Lu 29/10 Kursoj kaj studgrupoj
Lu 5/11 Jubileo kaj historio 3.
Lu 12/11 Kursoj kaj studgrupoj
Lu 19/11 Numerludo - la ĉiu novembra tradicio.
Lu 26/11 Kursoj kaj studgrupoj
Lu 3/12 Jubileo kaj historio 4
Lu 10/12 Kursoj kaj studgrupoj
Sa 15/12 Zamenhoftago! Ĉiujare okazos komuna festeno kune kun la Kulturo-grupo en la Kultur-Domo en Dortheavej.

Feliĉajn festotagojn - ĝis revido dimanĉon la 6-an de januaro en la Kultur-Domo, kiam ni festene celebros la centjaran datrevenon de KEK. Mikaelo Bronŝtejn, fama esperanta verkisto kaj bardo, gastante nin posttagmeze gitare ludos kaj kantos siajn belajn komponaĵojn.

Lu 14/01 Mikaelo Bronŝtejn prelegos en la klubo pri la legendara 'SEJM-o'.

Pri la kotizo por 2008

La KEK-a kotizo (180,-) estas pageble pere de la reto; skribu, ni petas, vian nomon.
Bank-konto: 1551 2025558

Pri la kursaj tempoj:

Kursoj por daŭrigantoj kaj komencantoj okazas en la klubejo lunde 17.30 – 19.30.

ESPERANTO-KULTURGRUPO EKG - KIU? KIE? KIAM?


La Esperanto-Kulturgrupo (EKG) invitas vin al prelegoj en 2007. Ekde la jaro 2001 la *sendependa kaj libera Esperanto-Kulturgrupo (EKG)* aktive kaj kun sukceso servis kaj daŭre servas al la esperantistoj en Kopenhago kaj la Sunda Regiono per multspecaj valoraj aranĝoj (prelegoj, teatraĵoj, debat-vesperoj, Zamenhof-festoj ktp.) favore al la esperantistoj, la Esperanto-vivo kaj ĝia multfaceta kulturo en nia regiono. *Ni kunvenas unufoje monate dum la vintra duonjaro (Septembro-Aprilo) en Medborgerhuset, Danasvej 30B, salono n-ro 1, 2-a etaĝo.*

Kiel kutime, ni havas post la prelego agrablan kaj liberan interbabiladon en Esperanto. Dum la paŭzo ni ofertas teon, kafon, kaj kukojn; tio kostas 10 kronojn. Membroj pagas 10 kronojn por la prelego.

La aranĝoj okazas en la *Civitana Domo de Frederiksberg*, atingebla per aŭtobuso n-ro 29 el stacio *Vesterport* al la unua haltejo post *Danas Plads*, aŭ per la *Metroo* el *Nørreport* ĝis la stacio *Forum je Julius Thomsens Plads*, de kie vi piede daŭrigu laŭlonge de la placo kaj *Svend Trøsts Vej* ĝis nia kunvenejo en Danasvej 30B (300 m).

Hvordan finder jeg vej til Esperanto-Kulturgruppen EKG? - Kiel trovi la vojon al EKG? Vidu/se:

<http://world.maporama.com/idl/maporama/>



*Klubo
Esperantista
de
Helsingborgo*

Saluton ĉiuj!

Mi nur mallonge raportos, ke niaj vesperaj rondoj laboras laŭ la planoj; lunde stud- kaj diskutrondo ĉe Barbro kaj marde rondo de "komencintoj" en la Verdandi-domo. Ni daŭrigos ĝis decembro. Restas du klubkunvenoj en Café Birger: 20/10 kaj 17/11 je la 13.30-a horo).
Pri pasintaj okazaĵoj vi povas legi en apartaj artikoloj, pri ekskurso al Elsinoro kaj aŭtuna foiro en Germanio.

Ann-Louise

Ekskurso al Elsinoro

La 22-an de septembro Barbro, Helga kaj mi de la Klubo Esperantista de Helsingborgo ekskursis al Elsinoro, kie Lene Niemann profesie gvidis nin tra la ĉarma urbocentro kaj rakontis pri la historio kaj vidindaĵoj de nia sunda najbarurbo. Ni vizitis la preĝejon kaj monaĥejon de sct. Mariæ, vidis la plej malnovan domon de la urbo, Ankeret en Strandgade 27 de la jaro 1577 kaj post agrabla promeno iris al la domo, kie loĝas Lene, por manĝi bongustan kukon, trinki kafon aŭ teon kaj babili. Estis tre interesa ekskurso en bela vetero kaj ni ege ĝuis la posttagmezan promenadon en Elsinoro.

Jill Hilford



La Esperanto Klubo de Lund

Karaj LEK-anoj,
La 13-an de septembro ni renkontiĝis por rakonti pri dumsomeraj travivaĵoj.
Interesajn historiojn ni aŭdis kaj kelkokaze fakte ridegis.
Dum posta estrarkunveno estis decidite:
Klubrenkontiĝoj: 11/10, 8/11 kaj, plej versaĵne, jula festeto la 16-an de decembro (aparta invito venos).
Ĉi-aŭtune ne okazos prelegoj. Propono kune finprepari niajn tekstojn pri afrikaj kaj svedaj eminentuloj estis akceptita. Tiel ni samtempe ekzercos la lingvon, ĉu ne?
Ni sendis salutojn al niaj francaj geamikoj en Montendre kaj al Ambrose Polle kaj lia familio en Tanzanio. Ambaŭ jam dankis kaj resalutas.
Demando de Ulla Saether pri partopreno de LEK en la UN-tago – 24/10 – estis akceptita.
Pri la programo bonvolu rigardi paĝon 7!
Menciindas, ke la 24-an de junio LEK estis invitita al aranĝo en la Biblioteko de Järnåkra., gvidita de Ragnhild Berntsson-Laskowski. Ĝia devizo "Vivu multajn vivojn, legu multajn librojn" - vortoj de

Astrid Lindgren, audiĝis ankaŭ esperantlingve. Ni mallonge prezentis esperanton kaj disdonis etajn informfoliojn, sur kiuj ni emfazis la eblojn de interreto por informi kaj studi ĝia devizo "Vivu multajn vivojn, legu multajn librojn" – vortoj de Astrid Lindgren, audiĝis ankaŭ esperantlingve. Ni mallonge prezentis esperanton kaj disdonis etajn informfoliojn, sur kiuj ni emfazis la eblojn de interreto por informi kaj studi.

Kun aparta saluto al Anna-Greta Strønne:
En la katalogo Bofilex07 pri Nacia Poŝtmarko ekspozicio en Borås, meze de septembro, one povas legi:
Bo von Bahr, Esperanto – ett världsspråk.
Exponatet* avser att visa världsspråket esperanto, uppkomst och utveckling till ett världsspråk. Text på svenska och esperanto.
*Surekrane oni informis pri esperanto.
Eble, eble io simila povus aperi dum venontmonata foiri en Kopenhago.
Stig Wingårdh

Ragnhild Berntsson-Laskowski salutas per bildkarto el Svisio:
"Pasintmerkrede mi estis en konversacia rondo ĉi tie en Luzern, oni ankaŭ iom montris al mi la urbon, kaj loka esperantisto vizitis Andreon, kiu momente estas en malsanulejo..."

Anna-Maria Lange

Protokolo de la SEA-kunveno 13/10 2007 en Kvarnby Folkhögskola, Malmö

Partoprenantoj: Karin, Per-Olov kaj Sten el Malmö, Betty, Ileana, Jytte, Zita, Ole kaj Kim el Kopenhago, Ann-Louise el Helsingborg. Sten estis gvidanto de la kunsido kaj Ann-Louise protokolanto.

Raportoj

- KEM (Malmö) La inundo de la klubejo kaŭzis multajn problemojn kaj kostojn. Espereble la komunumo pagos partojn de ili.
La nova rektoro de Kvarnby estas favora al Esperanto. La klubo povas senkoste uzi la ejojn.
La klubo disdonis flugfoliojn dum la Malmö-festivalo
- KEK (Kph) La lingvofestivalo havis multajn vizitantojn
La klubo havis budon dum la Internacia Tago
Komencanta kurso kun 7 partoprenantoj
Denizo prelegis pri Vikipedio. Interese estas, ke en la dana Vikipedio "esperanto" estas inter la plej serĉataj vortoj.
- KEH (Hbg) La klubo havas du studgrupojn, diskutgrupon kaj komencintan grupon.

Kim raportis pri la laboro por okazigi Kulturano Esperanto-Festivalon en Elsinoro. Li havas bonajn kontaktojn kun la kulturestro de la komunumo.

Laborplanoj

- KEF okazos plej verŝajne 12-19/7 2008. Ĝi havas hejmpaĝon: kef.saluton.dk
KEM - partopreno en Malmöfestivalen (muziko, disdono de flugfolioj, partopreno en la "vortotendo")
ESF (Europeiskt Socialt Forum) okazos en Malmö fine de septembro 2008. DEA estas membro kiel landa asocio.
Decido: Ileana kaj Sten formas komitaton por partopreno en ESF.
KEK 100-jara jubileo 6/1 2008 en la Kultura Domo en Dortheavej. Mikaelo Bronŝtejn muzikos kun dana koruso
Lingva Festivalo, prefereble kune kun aliaj, ne-esperantistaj, grupoj.
15/12 2007 Zamenhof -tago aŭ en Dortheavej aŭ en Danasvej.
La 100-jara jubileo de DEA okazos 18-20/4 2008 kun ampleksa programo.

Kursoj

Ni ofertu diversspecajn kursojn kaj reklamu ilin en nia retejo.

Ponto

Nia celo estas, Ponto aperu nur en la retejo kaj estu konstante ĝisdatigita. Ĝis tiam ĝi estos daŭre sendata per poŝto kaj aperos 4-5 fojojn jare.

Ekstera informado

Ni estu videblaj partoprenu per budoj en diversaj aranĝoj, sendu "amaskomunikilajn leterojn" pri aktualaĵoj, kiel eble plej ofte parolu esperanton kaj montru ke ni legas esperantajn gazetojn.

Ceteraj demandoj

Ĉu SEA povos, pere de la fondusa mono de la eksa suda distrikto, aĉeti la ekspozician materialon de Kaisa Hansen? Nenio decido estis farita.

Venonta SEA-kunsido

Kim esploros ĉu la klubo de Lund povos aranĝi la kunsidon 26/4 2008. Se ne, la tasko iros al Helsingborg.

Post la kunsido la partoprenantoj havis la eblecon konatiĝi kun nia nova hejmpaĝo, ellaborata de Denizo kun helpo de Sten. La kunsido konfirmis la principojn de la retejo por la Sunda Regiono (vidu aldonajon).

Ann-Louise Åkerlund

Principoj por la retejo de la Sunda regiono

La retejo havu la nomon www.agado.net. Ĝi temu nur pri la agado, kursoj, informado, programoj ktp en la Sunda regiono kaj ne konkurencu kun aliaj retejoj. Kunlaborantoj, kun rajto aldoni tekstojn kaj fari ŝanĝojn en la retejo, estu nur homoj kiuj iel rilatas al la Sunda regiono. Ĝisnunaj kunlaborantoj estas la partoprenintoj de la SEA-kunsido 2007-10-13, kun Denizo kiel teknika respondeculo. Novajn danajn kunlaborantojn akceptos la danaj kunlaborantoj kaj inverse por la svedaj kunlaborantoj.

Evidentajn lingvajn erarojn de alia kunlaboranto oni rajtas korekti sen aparta diskuto.

La retejo estas kunlaborilo por la kluboj kaj aktivuloj en la Sunda regiono kun la celo eventuale estonte anstataŭi Ponton.

Sten Svenonius

PROGRAMO EN MALMÖ

Merkrede 7.11	Ordinara kunsido de septembro kaj oktobro. Tagordo en numero 3 En Kvarnby popolaltlernejo, Industrigatan 4.
Dimanĉe 18.11, 16-a h	Aŭkcio
Novembro	Inaŭgura festo de la "nova" klubejo okazos iam en novembro.
Merkrede 16.1	Renkontiĝo
Merkrede 30.1	Viva Gazeto
Merkrede 13.2	Amika semajno
Merkrede 27.2	Libro-aŭkcio
Merkrede 12.3	Jarkunsido

**Programo en Helsingborg
Bonvolu rigardi paĝon 5**

**Programo en Kopenhago de KEK kaj DEFA
Bonvolu rigardi paĝojn 3-4!**

PROGRAMO DE EKG

MARDON, 13.11.2007: *"Denove mi renkontiĝis kun espero..."*.

Alexander Kogan prelegas pri la rusa poeto, komponisto kaj verkisto - Bulat Okudzjava (1924-1997) - kunkreinto de la *"amatora kanto"* en Rusio. Prelego kun diversaj muzikekzemploj el kompaktaĵoj.

VENDREDON, 07.12.2007: *"Elementoj de la vivo kaj verkaro de Raymond Schwartz"*.
Prelego de Sten Svenonius, Malmö.

SABATON, 15.12.2007: *"Zamenhof-festvespero"*.

Ĉi-jare la Esperanto-Kulturgrupo EKG, kaj la Esperanto-klubo DEFA/KEK invitas al komuna ujutna Zamenhof-festvespero en Kopenhago. Dum la aŭtuno aperos pli da informoj *pri la programo, lokalo, adreso, limdato por aliĝi, kontaktulo(j) por aliĝi ktp...*

UK i Rotterdam 19-26 juli 2008	-31/12 -07	-31/3 -08	efter 1/4 -08	
1. Direkt medlem i UEA (ej MG)	1500	1880	2255	SEK
2. Icke direkt medlem i UEA	1880	2350	2820	
3. Medföljande, handikappad eller ungdom (född mellan 78-01-01 och 87-12-31), som är medlem i UEA	750	940	1130	
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är medlem i UEA	1130	1410	1690	

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 87-12-31 betalar ingen kongressavgift .

Anmälningssblankett för kongressen kan beställas hos:

Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, tel. 0415-501 52

Avgifterna kan komma att justeras uppåt om kronan försvagas.

Informoj pri esperantoklubo kaj grupoj de SEA

Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.

La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h en Kronetorpsgatan 94, 212 27

Malmö


Kontaktpersonoj: sten@agado.net

aŭ karin@agado.net

Karin Lindquist,

Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,

tel. 040-98 01 20



La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.

Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h en la ejo de nia studorganizo SENSUS,

Krafts torg 12 A.

Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,

Prennegatan 10 A, 223 53 Lund,

tel. 046-147309

aŭ rete:

Daniel Granello

drsgranello@yahoo.se

Allan Ljungstedt,

allan.ljungstedt@fv.se



Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.

La kunvenoj okazos la trian sabaton de la monato je la 13.30-a h

en Cafe Birger de la urba biblioteko.

Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund

tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe

Barbro Haraldsson tel. 042-121471

Aŭtuna foiro en Germanio

La 21-an ĝis la 24-an de septembro Peter kaj mi vizitis niajn geamikojn en Rodenkirchen ĉe rivero Weser nordokcidente de Bremen. Tie okazis grandega festo, foiro kun 800-jaraj radikoj. La urbeto estas malgranda, nur 4 000 enloĝantoj, sed la foiro estas la plej granda en la regiono.

Antaŭ la inaŭguro de la foiro sabate posttagmeze longa vico de belege kaj fantaziplene ornamitaj veturiloj paradas tra la

Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.

Kunvenas en Kulturhuset, Dorteavej 61, 2400 København NV.

Prezidanto Betty Chatterjee

Vejlegårdaparken 20, st.th.

2665 Vallensbæk Strand

tel 38 89 10 13, rete chatterjeebetty@hotmail.com



Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA

Kunvenas en Kulturhuset, Dorteavej 61, 2400 København NV.

Kontaktulo: Lene Niemann,

Hovedvagsstræde

9 E, 1., 3000 Helsingør, tel 49 26 13 19

Retadreso niemann@kabelmail.dk

www.jernbanesperanto.dk



K.E.K kaj DEFA kunvenas lunde 19.00 – 21.00.

Kursoj povas okazi ekde 17.00 – ĝis 21.00. Kafo, teo kaj kukoj aĉeteblas je la 19.00.h. la kluba programo komenciĝas je la 19.30 h..

Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG

Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per

buslinio 29 el stacio

Vesterport, salono n-ro 1,

dua etaĝo. Pordoj malfermitaj 19.00-23.00.

Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.

Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas

demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al

Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,

DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64

Persone al la kontaktulo de KEKG:

Torben Svendsen: esperanto@webspeed.dk

Al la asocio - KEKG: kulturgrupo@webspeed



stratoj. La esperantistoj de la "Esperanto-Grupo Subvisurgo" partoprenis sub la temo "Ek al Roterdamo".

Ni havis bonegan tempon tie, babilante, manĝante, trinkante ... La vetero estis mirinda. Ni certe provos trovi la tempon partopreni plia(j)n fojo(j)n.

Ann-Louise